Federação Espírita Brasileira

Sei
Spiritisma Esperanto - Informilo

SEI: Avenida Passos, 30 - 2º andar - Centro - 20051-040 Rio de Janeiro - RJ - Brasil - Interreto: www.boletimsei.com.br - e-mail: boletimsei@gmail.com
FEB: SGAN 603 - Conjunto F - Av. L2 Norte - 70830-106 Brasília - DF - telfone 055 (61) 2101-6161

Januaro / Februaro 2014 - nº 162

DOKTORO DEMEURE

D. Villela

Antoine Demeure loĝis en la urbo Albi, en la suda Francujo, kaj tie li elkarniĝis la 25an de januaro 1865, post longa kaj fruktodona vivo. Kiel homeopatia kuracisto, lia scio kaj lia karaktero havigis al li admiron kaj profundan estimon flanke de liaj kuncivitanoj, kaj malgraŭ lia alta aĝo, oni ne sciis pri ia lia laciĝo, kiam necesis helpi malriĉajn malsanulojn, al kiuj li ofte donacis ion por mildigi iliajn materiajn bezonojn, krom tio, ke li ne postulis pagon.

Ekkoninte la publikaĵojn de Allan Kardec, li fariĝis konvinkita spiritisto kaj granda disvastiganto de Spiritismo, kaj korespondis ankaŭ kun la Kodiginto, tiel ke stariĝis inter ili ligoj de frata amikeco, kvankam ili neniam persone renkontiĝis. Je la 30-a de januaro, Kardec informiĝis pri lia forpaso, kaj volis kontakti lin, kaj en tiu sama tago li ricevis belan mesaĝon transdonitan de Demeure, en kiu li nomis Kardec'on Majstro kaj amiko kaj priskribas sian rapidan superadon de la mortotorporo, sian ĝojon, kiam li sentis sin tute libera de la impresoj kaŭzitaj de la korpa eluziĝo kaj sian raviĝon fronte al la mirindaĵoj de la Dia Kreaĵo, kiujn li nun ĝuis sen la limigoj de korpaj sentumoj.

Aliaj mesaĝoj ricevitaj tiutempe montris, ke D-ro Demeure ankoraŭ klopodadas flegi malsanajn homojn – inter aliaj Kardec mem – por resanigi ilin aŭ mildigi ilian suferadon.

La atesto de Antoine Demeure kaj pliaj 17 aliaj estuloj, kiuj estis feliĉaj post sia reveno al la spirita mondo, klare montris, ke tia feliĉo ne konsistas el nenifara kontemplado, sed el daŭra bonfarado, ofte en la samaj sferoj, en kiuj ili agadis kiam ili estis sur la Tero.

Nun oni disponis pri informoj, ne nur pri simplaj konjektoj, pri la vivkondiĉoj en la spirita mondo, kaj tiuj informoj ebligis al Allan Kardec prezenti en la verko "La Ĉielo kaj la Infero" ampleksan studon pri la Dia Justeco, en kiu montriĝas, ke ĝi funkcias ĉiam kune kun la Dia Korfavoro.

Samtempe, oni ekhavis unu plian konfirmon pri la vortoj de la spiritaj bonfarantoj, kiuj respondecis pri la Kodigado, kiuj responde al la demando "Kial la vero ne estis ĉiam prezentita je atingebleco de ĉiuj homoj?" asertis la jenon: "Gravas, ke ĉiu ideo alvenu siatempe. La vero similas lumon: la homo devas alkutimiĝi al ĝi, iom post iom; male, li lumblindiĝas. Dio neniam permesis, ke la homo ricevu komunikojn tiel kompletajn kaj instruajn, kiel tiuj, nuntempe donataj..."

La spiritisma literaturo poste daŭris kaj plu daŭras, ampleksigante tiun konon, tiel montrante la plenumadon de la promeso de Jesuo, ke li sendos alian Konsolanton por klarigi al ni ĉion kaj resti kun ni por ĉiam (Johano, 14:15 ĝis 17 kaj 26).

◊

"La Ĉielo kaj la Infero" (Dua Parto, "Feliĉaj Spiritoj, D-ro Demeure").

MARIA EL NAZARETO

Frederico Guilherme Kremer

La XX-an jarcenton oni anoncis kune kun la pesimismaj pensoj de la filozofoj de la "morto de Dio", kiel Nietzsche (1844-1900) kaj Feuerbach (1804-1872), kiuj daŭris ĝis la komenco de la Dua Mondmilito kaj konkretiĝis per neniam antaŭe viditaj kvantoj da doloro kaj malespero. Tamen, ĝi surprize finiĝis, kun vivanta Dio en ĉiuj popolcensoj faritaj tra la mondo, kune kun fenomeno registrita en revuoj kiel "Time" kaj "Newsweek", kiun oni nomis Erao de Maria.

Plej signifoplena indiko estis la rimarkinde pli granda kvanto da pilgrimantoj, kiuj vizitas sanktejojn dediĉitajn al Maria, kiuj ekzistas en la mondo. Aliaj du gravaj faktoj estas la elstara nombro da regionaj

alnomoj al Maria, kiu povas nuntempe atingi la ciferon du mil en la tuta mondo, kaj atingas 300 nur en Brazilo, kaj la ponto, kiun la figuro de Maria iom post iom starigas inter kristanaj skoloj, katolikaj kaj protestantaj, kaj eĉ kun islamanoj, kiuj respektegas Marian, ankaŭ.

El la analizoj faritaj por klarigi tiun fenomenon, ni elstarigas tiun, kiu proponas kiel kaŭzon la nekonon pri ŝia vivo, kio favoras, ke la sinsekvaj generacioj povu starigi propran komprenon, kaj precipe, ke ĝi respegulu la dezirojn pri spiriteco, aparte fine de la XX-a jarcento, post tiom da suferoj. Ĉar Jesuo anticipis sian publikan instruadon okaze de la geedza ceremonio en Kanaano, pro ŝia peto, tial oni konsideras Marian kiel la grandan propetanton favore al la homaro, apud Jesuo. Se la Majstro estas la suno por niaj animoj, Maria estas la luno, kiu respegulas Lian lumon, dum la nokto de la homaj suferoj.

Efektive, pri Maria ni malmulton scias, ĉar la Evangelioj ne estas biografiaĵoj pri Jesuo, kaj tial la komenca parto, kiu koncernas Lian naskiĝon, infantempon kaj junultempon enhavas multajn mankojn, kiuj lasas malplenajn lokojn, plenigitajn per apokrifaj evangelioj (nome, tiuj, pri kies aŭtentikeco oni dubas), kaj, por spiritistoj, per informoj alportitaj per mediumeco, kiuj same meritas analizadon, ĉar ankau ili povas ne esti veraj, depende de la kvalitoj de la mediumo kaj de la komunikanta Spirito.

Interesiĝo pri Maria estas antikva kaj devenas de la primitiva eklezio. Post longaj diskutoj pri la dia naturo de la Kristo, precipe en la orienta eklezio, kie oni parolis la grekan lingvon, nome lingvon favoran por diskutado, ĉar en ĝi la vortoj povas havi diversajn sencojn, oni turnis atenton al Maria. Kiel kompreni la patri-

non de Jesuo, se oni konsideras Lin Dio, laŭ la kredo el Niceo? Aperis tiam la kvar dogmoj pri Maria.

En junio 431, okaze de koncilio en la urbo Efezo, oni difinis la unuan dogmon, kiu estas la dia patrineco. En la jaro 641, en la katedralo de Latrono, en Romo, la eternan virgecon. En la jaro 1854, la senmakulan koncipon, tio estas, Maria ne havis la originan pekon, kaj antaŭ nelonge, en la jaro 1950, ŝian ĉielenvenon, nome la resurekton en la korpo, kiel Jesuo. Multaj fakuloj konsideras, ke sur Marian oni projekciis paganajn kredojn pri granda patrindiino. Ni memoru, ke en la jaro 410, barbaroj de Alariko prirabis Romon kaj kraŭzis grandan malfortecon en la kristanan komunumon, kaj pligrandigon de kritikoj flanke de la aristokrata paganismo, kiu ankoraŭ havis multajn adeptojn, kvankam tiutempe Kristanismo jam estis la oficiala religio de la Romia Imperio.

Se oni flanken lasas dogmojn, ĉar ili ne apartenas al la strukturo de spiritismaj pensoj, kvankam ili estas respektindaj kiel simboloj, tiu Maria kiun la Evangelioj prezentas al ni havas elstaran virton, nome humilecon, kio evidentiĝas el la okazaĵoj, kiuj envolvis la naskiĝon de la Savanto. Humileco en la senco, ke ŝi sciis, malgraŭ ke tre juna, kiu ŝi estas, kaj kiu estas ŝia misio sur la Tero, kiel esprimite per ŝia konata diraĵo al anĝelo Gabriel: "Jen ĉi tie sklavino de la Sinjoro, plenumiĝu en mi Lia volo." Sekve, oni sentas rezignacion kaj sindediĉon al Dio, kiuj ornamis amoplenan patrinan koron.

Kiel kutime ĉe juda familio tiutempa, Maria respondecis pri la edukado de Jesuo ĝis proksimume lia 8-a aĝojaro, kiam Jozefo alprenis tiun taskon. Maria scipovis eduki Jesuon por Lia misio, lasante lin for de siaj propraj projektoj kaj ideoj, kio estas ordinara afero inter gepatroj. Tamen, ni emas mencii aludon fare de la Spirito Humberto de Campos, en la belega verko "Bona Mesaĝo" (eldonejo FEB, ĉapitro 30), per la mediuma laboro de Francisco Cândido Xavier.

La aŭtoro raportas kompletigon de la sola fakto menciita en la Evangelioj pri la adoleska tempo de Jesuo, kiam li estis 12-jara kaj forperdiĝis de siaj gepatroj en Jerusalemo (Luko, 2:41-52). Afliktite, Maria trovis Lin, kiam li konversaciis kun sacerdotoj en la Templo. Tiuokaze, impresitaj de la saĝeco de la knabo, ili proponis al Maria grandan ŝancon por malriĉa familio: edukadon de Jesuo en la Templo. Ŝi entuziasmiĝis pro tiu propono kaj ĝin sciigis al sia filo, sed li pripensis kaj prudente respondis, ke li restos kun sia patro por helpi lin en la laboro.

Humberto de Campos klarigis ankaŭ, ke Maria loĝis en Efezo, kun la evangeliisto Johano, kio konfirmis la viziojn de aŭgustena monaĥino Ana Emerik, komence de la XIX-a jarcento. Ana grave malsaniĝis kaj ekhavis viziojn. Je unu el tiuj, ŝi priskribis la domon de Maria, kiu staris tri horojn for de Efezo, sur monteto.

Tiuj vizioj vekis intereson de la verkisto Clemens Brentano, kiu publikigis libron pri ili en la jaro 1852. En 1881, franca pastro venis al Turkujo kaj eltrovis la domon de Nia Sinjorino. Nuntempe, ĝi estas multnombre vizitata sanktejo.

Ni finas rememorante la lastajn vortojn de Maria en la Evangelioj, kiuj sonas kiel fundamenta rekomendo al la homaro. Okaze de la geedza ceremonio en Kanaano, ŝi admonis la servistojn plenumi la ordonojn de Jesuo, dirante: "Faru ĉion, kion Li diros al vi."

*

La figuron de Maria el Nazareto, kiu malfermas ĉi tiun artikolon, oni konceptis helpe de Spirito Emmanuel, per la mediumo Chico Xavier. Por la farado de tiu vera "priskribportreto", Chico transdonis al la pentristo Vicente Avela, el San-Paŭlo, detalojn pri la figuro, kiun la patrino de Jesuo prezentas, kiam ŝi vizitas spiritajn sferojn pli proksimajn kaj malharmoniajn ĉe la Terkrusto, kie Legianoj de Maria elvolvas helpan laboradon favore al Spiritoj de memmortigintoj, agado jam revelaciita per la mediumo Yvonne do Amaral Pereira en la verko "Rememoroj de Memmortiginto".

♦

"En la preĝo ni disponas la plej altan sistemon de komunikiĝo inter la Tero kaj la Ĉielo. Per la dia preĝo-cirkvito, la kreito petas la Kreinton pri helpo kaj la Kreinto respondas al la kreito laŭ la nekontraŭebla principo de la spirita reflektado, al li etendante la Eternajn Brakojn, por ke li altiĝu el la valoj de la vivo fragmenta sur la suprojn de la Venka Vivo." – Emmanuel.

El la libro "Penso kaj Vivo"

Sei
Spiritisma Esperanto - Informilo

Dumonata Bulteno Virtuala
eldonita de
Brazila Spiritisma Federacio

Direktoro:
Danilo Carvalho Villela
Editoroj:
Jorge Pedreira de Cerqueira
Eloy Carvalho Villela

Adreso:
Av. Passos, 30 - 2º andar
Centro - Rio de Janeiro - RJ
20051-040 - Brazilo
Telefono 55 (21) 2242-8872

TRA LA MONDO

KOLOMBIO

Perri com dirigentes do "Senderos" em Bogotá

Kolombia Spiritisma Konfederacio (Confecol) realigis seminarion pri "Unuiĝo kaj Unuecigo en Epoko de Transiro", kun la prezidanto de Brazila Spiritisma Federacio (FEB), Antonio Cesar Perri de Carvalho. La celpubliko estis la estraranoj de spiritismaj asocioj el Kolombio. Ĝi okazis en Bogota en la sidejo de la Spiritisma Asocio Tria Revelacio. Perri ĉeestis ankaŭ la kunsidon de la Nacia Federacia Konsilantaro de Confecol. Inter aliaj aktivecoj la prezidanto de FEB faris ankaŭ publikan prelegon en la Spiritismaj Asocioj "Senderos de la Esperanza" (Vojoj de la Espero) kaj "Rutas de Luz" (Itneroj de Lumo). La vizito al Bogota okazis en la tagoj 15ª kaj 18ª. Pliaj detaloj en www.confecol.org.

NEDERLANDO

La Asocio por Spiritismaj Studoj Allan Kardec, de Hoorn, disponigas en interreto, senpage, la Pentateŭkon de la Spiritisma Doktrino en la nederlanda. Por tio oni devas aliri www.allankardec.nl/#!basisboeken/c152h. Aldonaj informoj ĉe vereniging@allankardec.nl ou telefone 06-45267902.

VENEZUELO

Perri na 'Mensaje Fraternal', em Caracas

Venezuelo ricevis unuafoje la viziton de prezidanto de la Brazila Spiritisma Federacio. Antonio Cesar Perri de Carvalho, kiu estas ankaŭ la unua sekretario de la Internacia Spiritisma Konsilantaro, alvenis al tiu lando post taskoj plenumitaj en Kolombio. En Karakaso, li interparolis kun direktantoj kaj kunlaborantoj de "Mensaje Fraternal" (Frata Mesaĝo) kaj subskribis kun la prezidanto de tiu-ĉi institucio kaj eldonejo, Alipio Gonzalez Hernández, kontrakton de partnereco kun FEB por la diskonigado de libroj en la hispana.

Perri faris prelegon en "Escuela de Ciencia y Filosofia Universal" (Lernejo de Scienco kaj Universala Filozofio", en Maracaj, kaj en la "Asociacion Civil Socrates" (Civila Asocio Sokrato), en Barquisimeto, kie li ankaŭ faris seminarion pri "Unuiĝo, Movado kaj Spiritisma Asocio", por spiritismaj direktantoj el pluraj partoj de la lando.

"Tiu ĉi estis la unua publika aktivecoj de la ĵus fondita Venezuela Spiritisma Konfederacio, direktita de Jose Vasquez" – diris la prezidanto de FEB.

La vizito al Venezuelo okazis en la tagoj 19ª ĝis 23ª de novembro. Pliaj informoj per e-poŝto centrosocrates@venezuelaespirita.org.

LIBRO

VERDA SIGNALO



Ne ĉiam eblas ĝui plenan pacon en nia vivo ĉar eksteraj perturboj atingas nin kaj postulas sinoferojn kaj ekstran dozon da pacienco. Kaj tiu kapablo trakti malfacilaĵojn ne estas io akirebla en kelkaj horoj. Ĝi rezultas el ĉiutaga klopodo, kiu postulas serenan mensan sintenon, etiko en la agado kaj kultivado de bonaj sentoj.

Por helpi tiusence al ĉiuj kiuj troviĝas mergitaj en la fizika mondo la spirito Andreo Ludoviko skribis, pere de Francisco Candido Xavier, la libron "Verda Signalo".

Facile legebla – oni povas eĉ ĝin malfermi hazarde – tiu libro proponas sekuran vojon por ĉiuj kiuj kredas je komuna saĝo, bonedukiteco kaj respekto al aliaj kaj al si mem kiel ingrediencoj de feliĉo kaj bonfarto.

"Legante ĝiajn edifajn paĝojn estos al ni facile rimarki, ke en ĉiu ĉapitro ni trovos lumsignojn senkurtenigantajn al ni klaran vojon, kvazaŭ dirante al ni, ke se ni praktikos la principon de bono al la proksimulo tiom, kiom ni deziras la bonon al ni mem, ni libere povas sekvi antaŭen, stirante la ĉaron de nia vivo al la regionoj de altiĝo kaj de la progreso, en paco kun la aliaj kaj kun paco en ni mem per la nekoruptebla forto de la trankvila konscienco" – diras la spirita mentoro de Chico Xavier, Emmanuel, kiu subskribas la antaŭparolon de la libro.

Plej simple verkitaj la oportunaj consideroj de Andreo Ludoviko pritraktas variajn ĉiutagajn okazaĵojn, komencante de la matena vekiĝo.

"Se vi ne havas la kutimon preĝi, esprimu serenajn kaj optimismajn pensojn, dum kelkaj momentoj, antaŭ ol repreni viajn proprajn laborojn" – sugestas Andreo.

Alia menciinda aspekto estas la mesaĝoj de konsolo kaj stimulo kiuj multe povos helpi en la pli malfacilaj tagoj:

"Ne anticipe afliktiĝu, ĉar eble la vivo solvos vian problemon, ankoraŭ hodiaŭ, sen kia ajn klopodo via. Ne estas la afliktiĝo kio neniigas la personon sed ja la afliktiĝo kaŭze de la afliktiĝo. Antaŭ viaj nunaj malfacilaĵoj vi jam alfrontis sennombrajn aliajn kaj liberigis vin de ĉiuj per la nevidebla helpo de Dio. (...) Kalkulu la benojn kiuj riĉigas vian vivon, rimarkante la malbonojn kiuj okaze vizitas vian koron, por rekoni la grandegan saldon da avantaĝoj favore al vi."

Kvankam unue publikigita en 1971 per la eldonejo "Comunhão Espírita Cristã", la libro plene aktualas kiel la leganto mem povos konstati laŭlonge de ĝiaj 50 ĉapitroj en kiuj estas traktataj temoj kiel: "Salutoj", "Sur la kampo de la voĉo", "Inter geedzoj", "Sur la strato", "Pri la profesio", "Malagrablaj manieroj", "Festoj", "Antaŭ la sekso", "Vizitado al malsanuloj" kaj "En la socia helpado".

Alia interesa aspekto estas ke tiu ĉi libro de Andreo Ludoviko povas esti bona donaco ankaŭ por tiuj kiuj ankoraŭ ne havis kontakton kun la Spiritisma Doktrino, ĝuste pro ne paroli rekte pri Spiritismo, prezentante, tamen, en diversaj lokoj, konceptojn pri spiritualeco kaj memhelpo.

"Verda Signalo" havas 100 paĝojn, 13,5x18cm kaj estis publikigita en Esperanto per Eldonejo Lorenz: PK 3133 BR-20001-970 Rio de Janeiro-RJ – Brazilo – e-mail editora_lorenz@uol.com.br.

EL LA KUNFRATOJ

RENKONTE AL JESUO

Maria Emília Barros

"Kaj ĉar pro la amaso ili ne povis alporti lin al li, ili malfermis la tegmenton super lia kapo, faris truon kaj mallevis la brankardon sur kiu kuŝis la paralizulo." (Marko, 2: 4).

"Multaj personoj konfesas sian necesecon de Jesuo. Sed ofte pretekstas obstaklojn kiuj malebligas al ili la subliman alproksimiĝon.

(...) Por ke ni nin sentu en la najbareco de la Majstro (...), endas ampleksigi nian kapablon kaj niajn proprajn rimedojn kaj marŝi renkonte al Li, sub la lumo de vivanta fido.

(...) Kaj en la hipotezo alfronti grandajn malfacilaĵojn por ĝui la ĉeeston de Kristo, pro materiaj malhelpoj, direktiĝu al la Alto, kun la subteno de viaj spiritaj amikoj, kaj lasu vin fali antaŭ Liaj diaj piedoj, ricevante fortojn novajn kiuj refaru vian pacon kaj kuraĝon" (Emmanuel – "Caminho, Verdade e Vida" – "Vojo, Vero kaj Vivo", ĉapitro 118, psikografio de Chico Xavier, eldono FEB).

Ni estas spiritistoj. Ni kredas Dion kaj Jesuon. Por ni, Dio estas "la superega intelekto, primara kaŭzo de ĉiuj estaĵoj", ĝi estas eterna, neŝanĝema, nemateria, unika, ĉiopova kaj superege justa kaj bona.

Ni scias ke Jesuo esta la modelo kaj gvidanto por la tuta homaro.

Multaj pensas ke se ni povus esti pli proksimaj al Jesuo, se ni povus tuŝi Lian mantelon, kaj senti Lian vibron, aŭdi Lian voĉon kaj senti Lian amzorgon, ĉiuj niaj preokupiĝoj kaj malfacilaĵoj estingiĝus. Sed ne estas tiel.

La Evangelioj prezentas epizodojn el la epoko de Jesuo kiuj montras la neceson ke ni ĉiuj klopodu. La Spirito Emmanuel memorigas nin pri la epizodo de la paralizulo kiu dezirante vidi Jesuon kaj aŭdi Lin sed nekapabla eniri la domon kie Li estis, petis helpon al amikoj kiuj malfernis la tegmenton, levis kaj poste mallevis lin tra truo ĝis la ĉambro kie Jesuo troviĝis.

Analizante tiun rakonton ni povas observi:

- en la helpopeto al la amikoj, la neceson preĝi, ne nur pervorte, sed kun la animo plena je konfido al Dio;
- en la kunlaboro de la amikoj, la konstantan ĉeeston de la spiritaj bonfarantoj, niaj veraj amikoj, kiuj nin amas kaj protektas kaj kiuj estas ĉiam proksimaj de ni;
- en la movo supren, la subtenon de la spiritaj mentoroj kiuj utiligas nian volon kaj klopodon por ampleksigi niajn fortojn, helpante al ni ĉiam;
- en la renkontiĝo kun Jesuo, la certecon ke venkante obstaklojn ekzistantajn en nia propra animo kaj nin donante al la Majstro kun fido, volo kaj persistemo, ni sentos Lian amon, plenigante nian animon per novaj energioj kiuj restarigas pacon kaj kuraĝon.

Ni ne povas esperi ke la Majstro faru por ni la laboron pri renovigo kiun ni devas realigi. Moralaj aŭ fizikaj malhelpoj kiuj nin ĝenas originas en niaj mankoj kaj en malsimpatioj kiujn ni estigis en antaŭaj ekzistadoj. Al ni koncernas, tial, iri al la Majstro, pere de preĝo kaj konfido je la spiritaj bonfarantoj por ke tiuj malhelpoj sin montru malpli pezaj kaj la renovigitaj energioj ebligu al ni partopreni en la konstruado de bono.

♦

"Helpu, konversaciante. Bona parolo ĉiam bonefikas" – Emmanuel.

El la libro "Kristana Agendo"

INFORMOJ

VIDEO DE LA SEPDEKAJ JAROJ PRI CHICO XAVIER RETROVITA

Malmultaj personoj memoras sed, en la sepdekaj jaroj, Capemi (Kapemi), entrepreno kreita de spiritistoj por subteni la grandan socian laboron de "Lar Fabiano de Cristo" (Hejmo Fabiano de Kristo), faris filmon pri la mediumo Chico Xavier. Ĝi estas mallongdaŭra kaj la filmadon faris Nelson Pereira dos Santos, konata filmreĝisoro en Brazilo.

"Estas pluraj necertecoj pri tiu filmo, ĉar ĝi ne estas en katalogoj kaj oni ne scias la daton kiam ĝi estis farita. Sed tiuj estas detaloj. Ĉi kaze, pli ol la detaloj valoras la mirindaj scenoj de Chico Xavier kiujn la filmo prezentas. Ili, certe, faros ke ĉiuj kiuj amas Chico Xavier'on sin sentu profunde tuŝitaj" – diras la ĵurnalisto João Marcos Weguelin, el Rio de Janeiro, unu el tiuj kiuj sin mobilizis por trovi la filmon kies kopio estis ĝentile donacita de la konata spiritisto Cesar Soares dos Reis, prezidanto de Capemisa (Kapemiza), la nuna nomo de Capemi.

La filmon oni povas spekti en www.vinhadeluz.com.br/site/noticia.php?id=1609#.Um_ZNMlQe_R.facebook.

SPIRITISMA REVUO EN LA ANGLA



La angla eldono de "Spiritisma Revuo", de Allan Kardec, de la monatoj oktobro-decembro, disponeblas senpage, por legado kaj presigo en la retejo de Internacia Spiritisma Konsilantaro kiu nun respondecas pri tiu publikigaĵo. Inter la ĉefaj artikoloj de tiu ĉi eldono estas "La konscio estas primara, ne ia komprodukto de la cerbo", de la psikiatro Dro Raymond Moody Jr.; "Meandroj de deprimo", de la terapeŭtoj Iris kaj Claudio Sinotti; kaj "Administrado de emocioj por la senmorta feliĉo", de la psikiatrino Vanessa Anseloni.

Por vidi la revuon aliru www.spiritistmagazine.com/issues/2013/tsm_23_oct-dec2013.pdf. Tiu kiu preferas povas mendi ĉe www.spiritistmagazine.com la presan eldonon kies kosto estas 10.40 dolaroj.

JK KAJ CHICO XAVIER

En freŝdata intervjuo en TV, la brazila verkisto kaj historiisto Ronaldo Costa Couto, aŭtoro de nova biografio pri la prezidanto Juscelino Kubistschek (1902-1976), prezentis interesan informon: en momentoj de politika krizo aŭ de duboj, Juscelino, aŭ JK kiel li fariĝis konata, sin turnis al la mediumo kaj amiko Chico Xavier (1910-2002). En sia libro "O Essencial de JK" (La Esenca pri JK), Ronaldo informas ke la prezidanto formulis demandojn kiuj estis prezentitaj al Chico, kiu psikografiis la respondojn. Tio okazadis ekde 1954 kiam Juscelino fariĝis guberniestro de ŝtato Minoj. La verkisto ankaŭ mencias la kontakton de JK kun la mediumo pri kuracado Zé Arigó (1922-1971).

"En la libro *Registros Imortais* (Senmortaj Registroj), publikigita en la portugala per la eldonejo Vinha de Luz, ni trovas la kolonelon Nélio Cerqueira, komandanto de Militista Polico de Minoj, amiko de Chico kaj parteprenanto en la memorindaj kunvenoj por malobsedo de Grupo Meimei (fondita de Chico, en Pedro Leopoldo, ŝtato Minoj). Tutcerte kolonelo Nélio estis la ligilo inter Chico kaj JK" – asertas la esploristo Geraldo Lemos Neto, gvidanto de Muzeo Chico Xavier, en Pedro Leopoldo.

JK estis la brazila prezidanto de 1956 ĝis 1961 kaj ĉefrespondecis pri la konstruado de la nova federacia ĉefurbo, Braziljo. Intervjuo en TV www.youtube.com/watch?v=tbyJ67AVf4M.

CHICO XAVIER EN AMAZON



"Nosso Lar" (Nia Hejmo), "Os Mensageiros" (La Mesaĝistoj), "Ação e Reação" (Ago kaj Reago), "Missionários da Luz" (Misistoj el la Lumo), "Há Dois Mil Anos..." (Antaŭ Du Mil Jaroj...), "Ave, Cristo!" (Saluton, Kristo!) kaj "Paulo e Estêvão" (Paŭlo kaj Stefano) estas kelkaj el la multaj libroj psikografiitaj de Chico Xavier kaj publikigitaj per Edicei, de la Internacia Spiritisma Konsilantaro, disponeblaj por vendo ĉe la monde konata retejo por aĉeto Amazon.com. Estas libroj en la angla, hispana kaj titoloj en la portugala eldonitaj de Brazila Spiritisma Federacio kaj aliaj eldonejoj en prezentoj presa aŭ cifereca.

Por iri al la libroj aliru www.amazon.com kaj tajpu en serĉi la nomon "Francisco Cândido Xavier".

NILSON DE SOUZA PEREIRA

Elkarniĝis en la 21ª de novembro, en la urbo Salvadoro, en la brazila ŝtato Bahia, Nilson de Souza Pereira. Li estis 89-jara kaj jam delonge suferis pro cancero. Onklo Nilson, kiel oni lin nomis, naskiĝis en tiu ĉefurbo en la 26ª de oktobro 1924 kaj tie li fondis, kun la mediumo Divaldo Pereira Franco, en 1947, la Spiritisman Centron Vojo de Elaĉeto kaj, en 1952, la socian fakon de tiu institucio, la Loĝejon de la Vojo, kiujn li prezidis dum pli ol 60 jaroj.

Nilson laboris kiel bankoficisto kaj telegrafisto de Mararmeo kaj emeritiĝis kiam li laboris en la brazila poŝto. La ligo kun Divaldo ekestis en Mararmeo, kiam Nilson ĉeestis klasojn de la portugala lingvo kiun instruis Divaldo. Nilson organizis plurajn librojn psikografiitajn de Divaldo.

En 2005, Nilson ricevis la titolon de Ambasadoro de la Paco en la Mondo, aljuĝita de "Ambassade Universelle pour la Paix" (Universala Ambasadorejo por la Paco), en Ĝenevo (Svislando), estante la 206ª Ambasadoro de la Paco en la Mondo. Lia korpo estis sepultita en Salvadoro kun grandnombra ĉeestantaro.

FILMO PRI ABORTIGO EN BRAZILAJ KINEJOJ

La dokumentfilmo "Blood Money" (Mono el Sango) premieris en Brazilo en la 15ª de novembro. Reĝisorita de David K. Kyle kaj rakontita de Alveda King, nevino de Martin Luther King, la filmo montras la realon de abortigo kaj la mallumajn originojn de ties laŭleĝigo en Usono kaj Eŭropo. Ĝi malkaŝas ankaŭ kiel ideologio bazita sur rasismo kaj limigo de la loĝantar-kresko enŝteliĝis en la movadoj por defendo de virinaj rajtoj por krei fian kaj potencan negocon.

"Blood Money" estis lanĉita en naŭ brazilaj ĉefurboj. Ĝian eltiraĵon, kun subtekstoj en la portugala, ankoraŭ eblas vidi en www.youtube.com/watch?v=mx3ZHc54RE4&feature=youtu.be.

♦

"Nur Dio povas juĝi ĉies senton" – Andreo Ludoviko.

El la libro "Verda Signalo"